

FLANDRA ESPERANTISTO

MONATA REVUO

ORGANO DE LA FLANDRA
ESPERANTO
MOVADO

**N.E.L.E.* (Nia Estas La Estonteco)
Flandra Esperantista Grupo
Ejo * Breughel *
Rue Jacquemabaan, 37, Brussel, Belgio*

Oficiala Organo
de

Flandra
Ligo
Esperantista



JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belgoj.
Kun membreco al « Flandra Ligo Esperantista »: 25 fr.
Eksterlando: 6 belgoj.

Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag

Magdalenastraat, 29, KORTRIJK

Poŝtĉekkonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

EL LA PREZARO:

| | | |
|---|----------|-------|
| En okcidento nenio nova — Remarque. | Fr. 55,— | bind |
| La Viro el Francujo — Ivans | 29,— | » |
| Per Balono al la Poluso — Andrée | 65,— | » |
| Riĉa kaj sen Mono — Oppenheim | 29,— | » |
| La Ora ŝtuparo — Oppenheim | 29,— | » |
| Si — H. Rider Haggard | 29,— | » |
| Tra la Labirinto de la Gramatiko | 45,— | » |
| Elektitaj Noveloj — Lode Backelmans | 7,50 | broŝ. |
| Amo kaj Poezio — Jan Van Schoor | 10,— | » |
| La Du Amatinoj — de Musset | 7,50 | » |
| La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf | 12,— | » |
| Gösta Berling — S. Lagerlöf | 45,— | » |
| La Homaj rasoj de la Mondo | 24,— | » |
| Kudlago, la malgranda eskimo | 5,— | » |
| La Juna Vivo (1934-1935) | 15,— | » |
| Pallieter — F. Timmermans | 35,— | » |
| Barbro kaj Eriko — Letera romaneto | 4,— | » |
| Anni kaj Montmartre — R. Schwartz. | 18,— | » |
| Verdaj Donkifotoj — J. Baghy. | 18,— | » |
| Gaja Lernolibro (ilustrita) | 12,— | » |
| Examenopgaven | 12,— | » |
| Jubileumboek (Fed. Arbeiders Esperantisten) | 10,— | » |
| Blinda Rozo — H. Conscience | 4,— | » |
| Het Esperanto in 10 lessen — Witterijck | 5,— | » |
| Zakwoordenboekje (2400 stamwoorden) | 2,50 | » |
| Schidlof Zakwoordenboek | 30,— | » |
| Flandra Esper. 2-a, 3-a, 4-a, 5-a kaj 6-a jarkolektoj | 15,— | » |
| Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n° 1) | 10,— | » |

INSIGNOJ: Malgranda verda stelo: 2.00 fr.

Verda stelo, sur blanka fono: 2,50 fr.

Verda stelo, kun kruco: 2,50 fr.

Granda verda stelo, kun blanka rando: 4,50 fr.

Glumarkoj, en lingvo Flandra aŭ Esperanta: folio de 8 diversaj markoj kostas po 5,— fr. por 10 folioj.

Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1,— fr.

Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3,— fr.

Poŝtkartoj: por 10 po 1 fr.

Flandra Esperantisto

Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista
Aperas ĉiumonate



Ĉefredaktoro:

C. Schroeyers

Transvaalstraat, 10

Berchem

Antwerpen



Administranto:

Adolf De Keyzer

P. van Humbeekstr., 3

Brussel (West)

Jara abonprezo: 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belgoj

Kun membreco al F.L.E.: 25 fr.

Eksterlando: 6 belgoj

Poŝtĉeko: 2321.50 de F.L.E. Brussel.

Konstantaj kunlaborantoj: L. CALLOENS, G. DE-
BROUWERE, L. v. d. POEL, E. CORTVRIENDT,
H. VAN DURME kaj aliaj.

LASTA ALVOKO!

Kelkaj fidelaj abonantoj forgesis ĝis nun
pagi la kotizon por la revuo. Ni atentigas
ilin pri tio ke venontan monaton ili ne plu
ricevos ĝin. Do, Karaj Samideanoj, ne pro-
krastu; pagu tuj 20 Frjn je la ĉekkonto
Nr 232150, Flandra Ligo Esperantista, Brussel.

La tempo urĝas!

La kasisto F. L. E.

Esperanto in de Praktijk.

ARGENTINIE

Het radiozendstation van Rozario begon de uitzending van een Esperanto-kursus. — Naar een statistiek van « INTERNACIA RADIO-SERVO ESPERANTISTA » telt men, voor 1935, over de gansche wereld 1409 uitzendingen in Esperanto w. o. 1226 voordrachten en 183 lessen.

ARMENIE

Ten einde de belangrijkste werken harer nationale letterkunde in het buitenland bekend te maken, besloot de regering van Armenië enkele meesterwerken in Esperanto-vertaling uit te geven. In 1935 verschijnt een eerste reeks van 6 werken. Tot op heden verschenen in den handel meer dan 10.000 werken in Esperanto. In dit getal zijn zoowel vertaalde, als oorspronkelijke in Esperanto geschreven werken, begrepen.

DENEMARKEN

Het internationaal kongres van vegetariërs, gehouden te Dansaard, besloot voortaan Esperanto als officieele kongrestaal te herkennen. Al de vertalingen zullen in 't vervolg slechts in de Internationale taal geschieden.

ENGELAND

De Fransche handelskamer te London, publiceert regelmatig artikelen in haar blad.

FRANKRIJK

De jaarbeurs van Parijs liet een nieuwe propagandabrochure, alsook aanplakbiljetten met Esperantotekst, verschijnen. De jaarbeurs van Lyon maakt insgelijks ruim gebruik van de internationale taal.

GRIEKENLAND

In de middelbare scholen van Athene volgen 462 studenten Esperantokursussen. — In duizend scholen, van 60 verschillende landen, staat Esperanto officieel op het leerprogramma.

HONGARIE

Ter gelegenheid der jaarbeurs van Budapest, liet het Hongaarsch postwezen een reeks prentkaarten verschijnen met tekst in Esperanto. Het « Centraal Comité van Badplaatsen en Kuuroorden van Budapest » gaf een prachtig Esperanto-prospectus in het licht.

ITALIE

Het ministerie « Per la Stampa e la Propaganda » verzond het Italiaansch radioprogramma voor het buitenland. Opvallend zijn de talrijke Esperanto-uitzendingen.

JAPAN

Door de zorgen der nationale maatschappij van Staatsspoorwegen verscheen een vrouwblad voor reizigers in Mantsjeoukowo.

NEDERLAND

Het « Verbond der Nederlandsche Maatschappijen voor Vreemdelingenverkeer » heeft een brochure in Esperanto uitgegeven, getiteld: « La Lando de Rembrandt ».

OOSTENRIJK

Het beheer der P.T.T. van Oostenrijk heeft besloten een Esperantovertaling te voegen bij de vermeldingen welke voorkomen in den gids der Spoor- en Autobuswegen.

TSJECHO-SLOWAKIJE

De jaarbeurs van Reichenberg maakt ruim gebruik van Esperanto: alle drukwerken worden ook in de internationale taal uitgegeven, tolken staan de bezoekers-Esperantisten ten dienste. In de hoogere industrijschool van Morav-ska-Ostrava werd het onderwijs van Esperanto ingevoerd.

ZWITSERLAND

Ten gerieve der Esperantisten, gaf de stedelijke propagandadienst voor toerisme te Bern, een rijk geïllustreerd prospectus uit.

De Handelskamer van Parijs en Esperanto

Met algemeenheid van stemmen werd, in 1920, door de handelskamer van Parijs besloten, Esperanto, als facultatief vak, te plaatsen op den uurrooster van alle scholen die onder haar toezicht vielen.

Op 2 Juni 1931 werd door de vergadering der voorzitters van de fransche handelskamers een wensch aangenomen de propaganda voor Esperanto aan te moedigen, en de verbreiding van het Esperanto-onderwijs in alle handels- en beroepsscholen.

In « *L'Espérantiste Français* » (nummer van Juli-Augustus 1935) verscheen de mededeeling door den heer A. Baudet, voorzitter der handelskamer van Parijs en van de vergadering der voorzitters van de handelskamers van Frankrijk, voorgedragen in deze laatste vergadering. In deze mededeeling schetst de heer A. Baudet op welke wijze de handelskamer van Parijs er toegekomen is het belang van Esperanto te erkennen en Esperanto te steunen.

Deze mededeeling is belangrijk genoeg, dunkt me, voornamelijk voor niet-esperantisten, om ze in haar geheel te vertalen. Ziehier wat de heer A. Baudet schrijft :

In 1920, wanneer ik me heb aangesloten bij de handelskamer van Parijs kende ik niets van Esperanto. Ik stond sceptisch tegenover de draagkracht van deze taal, want ik had te voren reeds hooren spreken over Volapük, en ik moet bekennen dat ik niet erg geloofde aan de mogelijkheid eener internationale taal.

Maar in 1920 maakte ik deel uit van de onderwijscommissie der handelskamer, voorgezeten door den heer Pascalis. De heer Pascalis had van den Esperantistengroep uit Parijs een schrijven ontvangen ons vragende Esperanto in overweging te nemen en in te voeren in onze handelsscholen. Ik glimlachte bij dit voorstel, evenals al mijn kollega's ; doch de heer Pascalis zegde : « Ik ken niets van Esperanto, maar ik heb reeds veel internationale kongressen bijgewoond, en het ware een groote vooruitgang indien men het middel vond om mekaar te begrijpen. Men hoeft dus niet dit voorstel op voorhand als belachelijk te beschouwen. »

Ik werd aangeduid om het verslag op te maken ; ik antwoordde : « Geachte heer voorzitter, met genoegen ; na onderzoek zal ik U zeggen wat ik er over denk. »

Thuis gekomen opende ik het dossier en vond een spraakkunst « Esperanto in tien lessen ». Om mijn kollega's goed te kunnen inlichten was het noodig deze spraakkunst te doorlezen. Tot mijn groote verwondering vond ik genoegen bij het lezen van deze spraakkunst. Dit schijnt ongelooflijk want gewoonlijk is de spraakkunst een griezelig iets. Een tweede, insgelijks verrassende, vaststelling : ik kon alles, zonder de minste moeite, onthouden.

Ik las het kleine boekje en maakte de oefeningen met genoegen ; onder aan elke bladzijde merkte ik den tijd dien ik had besteed. Ik las in den metro, in den trein, een stuk hier en een deel daar ; en na zes uren aandachtige lezing, zooals men de regels leest van een spel, had ik het boekje door. Nadien heb ik mij nog wat ge oefend door het lezen van tijdschriften. In 't geheel heb ik aan dit onder-

zoek ongeveer tien uren besteed, waarna ik bekwaam was — ik heb zulks bewezen door naar Japan te schrijven — een handelsbrief te schrijven in Esperanto, het antwoord te ontvangen en dit zonder moeite te vertalen. Nadien heb ik de proef herhaald met eenige van mijn vrienden, o. a. onze geachte voorzitter Pascalis leerde Esperanto in tien uren, toen hij reeds 73 jaar oud was ; hij schreef me een brief van vier bladzijden zonder een enkele fout.

Het onderzoek op dit gebied was dus afdoende. Onnoodig U te zeggen dat zulks me eenigszins verbaasd heeft. Ik ben teruggekomen voor de onderwijscommissie en zegde tot mijn kollega's : « Ik durf geen besluit treffen ; voorheen was ik zeer sceptisch, nu vrees ik te veel in het tegenovergestelde te vallen. Ik zou niet graag de handelskamer te rap in deze richting sturen, mogelijk zou men met ons spotten. Esperanto, elkeen lacht als men er over spreekt, is als Volapük, maar ik denk dat Esperanto staat tegenover Volapük, zooals de moderne vliegtuigen tegenover het vliegtuig van Ader. Ik wensch dat men mij vier kollega's toevoege, teneinde met vijf een ondercommissie te vormen om de zaak grondig te onderzoeken.

Men heeft me vier kollega's toegevoegd ; een van hen werd gekozen omdat hij afwezig was, hij was namelijk op terugtocht uit Argentinië.

Als hij op de vergadering kwam, waartoe hij was uitgenoodigd, zegde hij ons :

— Ik weet niet waarom men me bij deze commissie heeft gevoegd ; ik ben een aartsvijand van elke hulptaal. Indien men er toch een aanvaardt dan moet het een nationale, en levende taal zijn ; een kunstmatige taal wil ik niet.

— Goed, en dewelke ?

— Spaansch.

— Dit is een meening ; ik zou misschien de fransche taal hebben verkozen ; een engelschman het engelsch. Geachte kollega, er valt slechts één ding te doen, we zijn hier niet om het U lastig te maken, ge zijt vrij, wij kunnen U vervangen.

— Neen, ik ben benoemd, ik blijf.

Ik heb vooreerst voorgesteld den heer Rollet de L'Isle uit te noodigen, een polytechniker en geleerde, voorzitter van den esperantistengroep uit Parijs, aan wien we allerhande vragen hebben gesteld.

Aan den heer Rollet de L'Isle heb ik gezegd : « Ik stel veel belang in Esperanto ter oorzake van de spraakkunst, maar hoe kunt ge met Esperanto, dat een kunstmatige taal is, alle nuances van het denken vertalen ? In de fransche taal, zooals ten andere in elke taal, bestaan gewestelijke, tzt. onvertaalbare uitdrukkingen. »

Het antwoord was eenvoudig :

« Juist. Ge spreekt van uitdrukkingen die niet kunnen vertaald worden ; deze moeten niet vertaald worden in eene internationale taal. »

Ik ben zonder argumenten gebleven tegenover dit volstrekt logisch antwoord. In Esperanto bestaan geen gewestelijke uitdrukkingen ; men moet zich klaar uitdrukken.

« Wat de nuances betreft », vervolgde de heer Rollet de L'Isle, « stel me op de proef, dan kunt U oordeelen. »

Wij hebben hem op de proef gesteld, ziehier op welke wijze. Het onderzoek heeft den ganschen dag geduurd. Wij hebben vier esperantisten uitgenoodigd en hen gescheiden in twee groepen. Wij hadden drie zeer nauwkeurige teksten gekozen waarin handelaars en industrieelen belangstellen en die ons bij gevolg zouden toelaten een oordeel te vellen over de waarde der taal. Deze teksten werden uit het Fransch over gezet in Esperanto door twee esperantisten en nadien, nadat deze twee waren weggezonden, door de twee andere esperantisten, weer in het Fransch overgebracht.

Bij algemeenheid van stemmen werd door de onderkommissie erkend dat de beteekenis volledig juist was weergegeven, ter uitzondering van een woord. Nadien bleek dat de vertalers de beteekenis van dit woord niet kenden; nadat het hun was uitgelegd konden ze de fout verbeteren.

Door gansch de onderkommissie werd deze proef afdoende geacht.

We zijn terug verschenen voor de kommissie die me gelast heeft een gunstig rapport op te maken over de propaganda van Esperanto, en het fakultatief onderwijs er van in onze handelsscholen.

Dit verslag werd aangenomen op 9 Februari 1921. Het eerste lid dat, na lezing ervan, het woord vroeg, om met kracht het verslag te steunen, was het lid der onderkommissie dat zich tevoren tegenstander had verklaard van elke kunstmatige hulptaal. »

* * *

In ons land is de belangstelling der handelskamers voor Esperanto verre van algemeen, en zeker niet actief genoeg. We hopen dat het verslag van den heer A. Baudet, die op korten tijd er toe gebracht werd te erkennen dat Esperanto op prachtige wijze de oplossing brengt der taalmoeilijkheden op internationaal gebied, de leidende personen in ons land, op handels- en nijverheidsgebied, er zal toe aanzetten Esperanto van nabij te onderzoeken.

De Vlaamsche Esperantobond verlangt niet beter dan hun, zoo noodig, alle gewenschte inlichtingen te bezorgen.

H. RAINSON.

^ Ĉu vi povas varbi por Esperanto ?

Samideano H. Novotny skribis en Heroldo de Esperanto : « Kiam oni rigardas la estantan staton, oni devas diri, ke rilate al propagando ne okazas ĉio, kio estas ebla. Certe ... mono, lerteco, kaj tempo limigas tre ofte nian agon, sed ofte la baroj estas nur imagataj. Mi trovis en la lasta tempo diversajn eblecojn, kiuj estus aplik-eblaj ankaŭ aliloke kun bona sukceso.

Mi prenis grandan kestan kovrilon (formato 80 × 120 cm.) fortikigis la malantaŭan flankon iomete, nigrigis la antaŭan (glatan) flankon, fiksas la kestokovrilon sur muro en homriĉa strato (kompreneble, post permeso de la posedanto) kaj nun mi tre ofte gluas sur ĉi-tiu propaganda tabulo varbfoliojn, interesajn gazetojn, memfaritajn varbafiŝegojn manskribitajn, rimarkindajn eldirojn de famaj viroj pri Esperanto, diverskolorajn gvidfoliojn pri diversaj urboj

... kaj niaj enloĝantoj ofte trovas novaĵojn pri Esperanto kaj parolas pri ĝi.

Krome mi kolektis kelkan monon kaj pagis por kelkaj monatoj varbobildojn en niaj filmteatroj (memfaritajn sur vitrodiskoj) por atentigi la publikon pri Esperanto. Ĉi ĉio ne kostas grandajn sumojn, sed oni povus atendi bonan sukceson, se en ĉiuj urboj aŭ vilaĝoj, kie loĝas esperantistoj en la tuta mondo ni agus same almenaŭ dum la vintro. »

Aldono : Ankaŭ en nia lando kiel ĉie loĝas favoraj oferemaj bonvolemaj gesamideanoj, sed vere mankas iomete la ideo por varbi por Esperanto. Ĉu ne estus eble pere de la Flandra Ligo Esperantista presigi sufiĉan kvanton da afiŝoj sur kartono ekz. formato 20 x 25 cm. kun iu ajn frazo (flandre kaj esperante) kiujn oni forvendus al la diversaj grupoj ? Se oni povas liveri ĉi tiujn je malalta prezo al la grupanoj, oni povus meti ilin en kafejoj, fabrikoj, montrofenestroj kaj sur lokoj kie ĉiam pasas sufiĉe da homoj. Bona rimedo por sciigi en nia lando ke ESPERANTO ekzistas, ĉar « nekonata estas neamata ». Tio estus taŭga por propagandi nian karan lingvon.

JEVA.

Kvin en unu

Jen letero presita en bulteno de asekuro-societo. Ĝi estis ricevita de la pretenda-fako de Amerika Asekura Kompanio. Mi ne konfirmas ĝian seriozecon.

Sinjoroj,

La senanimeco de Korporacioj kiel via estas miregiga. Mi reekzamenu mian aferon. Mi havas akcidento-polison de via Kompanio, en kies kondiĉoj vi konsentas pagi al mi po 25.000 dolaroj semajne dum tiom da tempo kiom mi ne povos labori pro ia akcidento.

Antaŭ unu semajno mi vizitis domon por mi konstruatan. Mi supreniris ŝtuparon (aŭ pli bone, lignan ŝtupetaron metitan kie lokiĝos la ŝtuparo kiam la domo estos konstruita), kaj ĉe la supra etaĝo mi trovis amason da brikoj, kiun oni ne bezonis tie. Sentante min laborema, mi komencis formovi la brikojn. En la lifto-ŝakto estis ŝnurego kaj pulio, kaj ligita al la ŝnurego estis barelo. Mi suprentiris la barelon ĝis la supra etaĝo, kaj, malsuprenirinte la ŝtupetaron, fiksas la ŝnuregon ĉe la malsupro de la ŝakto. Tiam mi resuprengrimpis la ŝtupetaron kaj plenigis la barelon per brikoj.

Denove mi malsupreniris (kvin etaĝoj, atentu !) kaj malfiksas la ŝnuregon por mallevigis la brikojn. La barelo estis pli peza ol mi, kaj antaŭ ol mi povis pristudi la cirkonstancojn, mi trovis min levata supren per la ĉiam pli rapidanta ŝnurego. Ĉu mi tenadas, ĉu ne ? Sed antaŭ ol mi faris decidon mi estis tiel alta ke, ŝajnis pli danĝere lasi min fali ol elteni. Do, mi eltenis. Duonvoje, mi renkontis la brikojn malsuprenirantajn. La renkonto estis mallongedaŭra sed vigla, kaj, el la du renkontantoj, mi suferis plie, sed daŭrigis la vojaĝon ĝis la tegmento. Pli ĝuste, la *plejparto* de mi pluvojaĝis. Mia epidermo alteniĝis al la barelo kaj reiris teren. Tiam mi frapis per mia korpo la tegmenton, kaj samtempe la barelo frapis la teren. La skuo senspirigis min kaj « sen-malsupraĵigis » la barelon.

Tiam *mi* estis pli peza ol la malplena barelo, kaj komencis fali teren, dum la barelo ekvojaĝis supren. Ni denove renkontis unu la alian, duonvoje, kaj la barelo rebatis min, pistis mian *solar plexus*, senŝeligis miajn tibiojn, kontuzis mian korpon, kaj senhäuhtigis mian vizagön.

Kiam ni malkunplektiĝis, mi daürigis mian veturadon al la tero, kaj la barelo al la tegmento. Post nelonge mi renkontis la teron tiel subite ke mi perdis mian mensceeston, kaj mi lasis iri la ŝnuregon. Tio liberigis la barelon, kaj de la supro de la ŝakto, ĝi falis funden, kaj alvenis plenpeze, — ja plenpeze — sur mi mem.

Konsideru la senkorecon de via Kompanio. Mi suferis pro kvin akcidentoj inter du minutoj : unu, kiam mi supreniris la ŝakton kaj renkontis la barelon planan je brikoj; la duan kiam mia korpo batis la tegmenton ; la trian, kiam mi renkontis la malplenan barelon ; la kvaran, kiam mi frapegis la teron; la kvinan, kiam la barelo frapegis min.

Via agento esprimas la konkludon ke *nur unu* akcidento okazis, ne kvin ; kaj ke, anstataŭ ricevi kompenson po 25.000 dolaroj, por ĉiu el kvin akcidentoj, mi nur rajtas ricevi por unu.

Tial, mi petas vin, nuligu mian polison, ĉar mi decidiĝis ke mi ne intencas esti senhäuhtigita, nek per barelo, nek per asekura Kompanio.

(Kun danko al la « Quarterly Bulletin » de Sao Paulo, (Brazila) fako de Toc H.).

*Tradukis Frank TAYLOR.
Halifax-Anglujo.*

Desiderio Erasmo (1467-1536)

Tiu-ĉi jaro estas tiu de la 400jara datreveno de la morto de Desiderio Erasmo, la plej granda humanisto de l'Renesanco.

Ni rememoras Erasmon, ĉar li estas filo de la Nederlandoj. Ni fieras pri li, kiel ni fieras pri Rubens, Wilhelmo de Oranĝo, Vondel, Ruusbroeck, Jacob Van Maerlant, kaj tiom da aliaj.

Sed ni, Esperantistoj, ankaŭ rememoras lin, ĉar li estis vera praktika internaciisto. Internaciisto en tempo, kiam oni ne jam eltrovis tiun vorton. Li loĝis aŭ vojaĝis i.a. en Francujo, Anglujo, Hispanujo, Italujo, Germanujo kaj Svislando. Li naskiĝis en Rotterdam, sed ankaŭ estis en Antwerpen kaj Anderlecht. Longan tempon li vivis en Basel (Svislando) por presigi siajn librojn, kaj ankaŭ tie mortis. Tamen la stigmato de lia nederlanda deveno kaj eduko neniam malaperis.

Liaj plej famaj verkoj estas la « Koparoladoj » (Colloquia Familiaria) kaj « La Laŭdo de l' Frenezeco », en kiuj li senkompatate vipas ĉiujn la koruptadojn de sia epoko. Pro lia akra, trafa stilo kaj spiritito oni nomis lin ankaŭ : « La latina Voltaire ».

Ni honoras lin antaŭ ĉio, ĉar li estis vera homo, sincera idealisto, (Vondel lin nomis eĉ la « Rotterdama Sanktulo »), ĉar li estis liberama homo, kiu ne timis esprimi kion li enkore pensis. Per lia granda spirito li priregis la tiamajn antaŭjuĝojn ; li havis viglan,

sed tamen prudentan plumon. Li ne estis fanatikulo, kaj pro tio, ĉu en katolikaj, ĉu en protestantaj medioj li havis egajn kontraŭulojn. Ne por la falsa oro de oficiala honorigo li marĉandis sian liberan opinionon. Li eĉ rifuzis kardinalan titolon.

Li verkis latinlingve, la internacia intelekta lingvo de tiu epoko. Eble tiel li atingis sian celon : konigi siajn opiniojn en eble plej vastaj rondoj.

Sed ni forvetas ke estas dank' al tiu lingvo, kiun (feliĉe !) la popolo ne komprenis, ke li ne estis mortbrulita kiel herezulo, sorto kiu trafis plurajn el liaj disĉiploj...

Ne estas nia intenco en tiu malgranda artikolo verki kleran studaĵon pri la skribaĵoj de l' granda Nederlandano. Pere de l' nuntempe ekzistantaj tradukoj en naciaj lingvoj, ni ĉiuj povas intime interkonatiĝi kun Erasmo. Kaj nia celo estas instigi Vin al tiu kontakto kun li. Tiam kun ni, vi preskaŭ ne povos kredi ke tiuj vortoj estas skribitaj antaŭ pli ol kvarcent jaroj. Vi miros pri la veraj modernaj ideoj de tiu mezepokulo. Kaj vi certe pensos : Kiel estas eble ke niaj gepatroj, niaj avoj ĝis antaŭ kvindeko da jaroj ankoraŭ kredis je tiom da superstiĉaj aferoj, pri kiu Erasmo jam humore kaj gaje ridis, eĉ se pastroj kredis je ili. Vi rimarkos la paralelon kiu ekzistas inter ideoj de liaj « Koparoladoj » i. a. pri la egoismo de l'homoj, kiuj preĝas al Dio, nur por personaj aferoj, kaj inter la paroloj, kiujn Feliks Timmermans dirigas de Pallieter : Ke la unuaj iras al Scherpenheuvel por demandi ke ne pluvu ĉar ili ŝatus festi, kaj ke aliaj precize preĝis por ke pluvu, ĉar tiam ili gajnus monon pro la rikolto !

Sed kio estas vere aktuala estas tiuj ĉi vortoj el la dialogo inter Charono kaj Alastoro ; (kiujn ni esperantigis laŭ la nederlanda traduko de N. J. Singels).

(Charono, kiu laŭ la greka mitologio devis ŝipveturi la animojn de la formortintoj tra la Stikso, plendis pri la multa laboro, kiu atendis, ĉar...)

... « Tri monarkioj kun ĝismorta malamo atakis unu la alian por reciproke detruiri sin, kaj ne plu restas parto de l' Kristana mondo, kie ne bruas la milito : ĉar tiuj tri kuntrenas la aliajn por kune interbatali. Iliaj intencoj estas tiaj ke unu ne volas cedi al la alia... La homoj estas tiel malbonaj ke nenie plu ekzistas la amikeco ; unu frato malfidas la alian, malkonsento regas inter edzo kaj edzino... »

Cu vere tion, oni ankaŭ ne povas diri pri nia tempo ?

Kaj en tiu sama dialogo, Alastoro rakontas :

« En la religiaj kunvenoj ili proklamas ke la milito estas justa, sankta kaj pia. Kaj por ke vi ankoraŭ pli miru pri la senhonteco de tiuj homoj : ili proklamas la saman al la du kontraŭuloj. Ĉe la Francoj ili klarigas al la popolo, ke Dio estas kun la Francoj kaj, ke tiu, kiu havas Dion, kiel protektanton, ne povas esti venkita. Ĉe la Angloj kaj la Hispanoj : ke ne estas la imperiestro, sed Dio mem kiu militas : se ili estus kuraĝegaj, tiam ili certe venkus... »

Nu, karaj gesamideanoj, bonvolu nur ŝanĝi la nomojn kaj vi legos la samajn frenezajn vortojn, kiuj en tiuj civilizitaj jaroj 1935 kaj

1936, denove estis cinike elparolataj, precize kiel... antaŭ kvarcent jaroj.

Kiel en la tempo de Erasmo la Frenozeco estas laŭdata, kaj priregas la mondon...

Erasmo ni ja ĉiam bezonas vian akran, justan vipon!

L. VAN DER POEL.

Argumentoj por internacia diplomacia Lingvo

La diversaj popoloj oficiale interrilitas pere de delegitoj kaj reprezentantoj kiujn oni nomas diplomatoj.

Estas klare ke, por atingi efikan laboron, la diplomatoj bezonas la konon de pluraj lingvoj. Bedaŭrinde, politikistoj plej ofte ne estas lingvistoj. Necesas do la uzo de komuna lingvo.

Jam en la antikva tempo la popoloj komprenis la bezonon de komuna scienca kaj diplomacia lingvo. En la glora epoko de Greklando la greka lingvo plenumis tiun rolon. Kun la fino de la politika forto de Greklando komencis la superrego de Romo kaj de la roma lingvo, nome la latina.

Dum pluraj jarcentoj la latina lingvo restis tiu de la scienculoj, de la potenculoj kaj de la diplomatoj. De la komenco ĝis nuntempe ĝi ankaŭ estas la lingvo de la katolika Eklezio. Jam antaŭ mil jaroj tamen la naciaj lingvoj sin altrudis por internacia uzo. Precipe la franca konis grandan sukceson kaj dum la 13a kaj 14a jarcentoj oni jam uzis ĝin ekster la franca landlimo. En 1404 la Angloj oficiale akceptis la francan lingvon por la redakto de la traktatoj, sed samtempe demandis ke la latina estu tiu de la ordinaraj interlandaj rilatoj. En la 15a jarcento la franca lingvo servis kiel oficiala parolilo inter Francujo kaj la dependaj landoj. En Bretagne, Bourgogne, Avignon, Flandrujo kaj en la Nederlandaj provincoj la franca lingvo estis tiu de la reĝoj, la grafoj, la dukoj kaj de la kortegaj rondoj.

Je la fino de la 15a jarcento aperis nova konkurento nome la hispana lingvo. Tamen, krom en Hispanujo kaj la hispanaj koloniĵoj, kie la hispana lingvo fukciis, nur du lingvoj, la franca kaj la latina, estis rigardataj kiel internaciaj kaj internacie uzataj por la traktatoj kaj la kongresoj.

Dum la 17a jarcento la latina lingvo perdis sian influon. La franca lingvo ĝin anstataŭis. Nuntempe la franca kaj la angla lingvoj ĝuas la superecon kvankam ili tute ne estas uzataj ekskluzive. Ni vivas en epoko de naciismo kaj ĉiu popolo ŝatas uzi sian propran lingvon. Dum la konferencoj la delegitoj fakte parolas sian gepatran lingvon, tiel ke oni bezonas la helpon de aro da tradukistoj. Ĉu vi ne legis en la ĵurnaloj ke la Neguso paroladis etiopie dum la lasta kunveno de la Ligo de la Nacioj en Genevo? Sin bazante sur la principo de egaleco ĉiu ŝtato havas la rajton uzi la lingvon kiun ĝi preferas. Oni facile komprenas ke la diverseco de lingvo treege malfaciligas kaj longigas la diskutojn tiel ke oni nur post longdaŭra konferencado akiras taŭgajn rezultojn. Krome, per la traduko la tekstoj ofte perdas la klarecon kaj la precizecon, kiuj estas plej necesaj en oficialaj skriboj kaj interrilitoj.

Por ilustrati la teorion mi citos nur unu ekzemplon. Dum la pripa-
 roloj por la traktato de 1905 inter Rusujo kaj Japanujo la dele-
 gitoj uzis kvar diversajn lingvojn : la francan, la anglan, la rusan
 kaj la japanan. La rusa reprezentanto parolis aŭ ruse aŭ france. Iu
 tradukisto tradukis en anglan, kaj dua tradukisto tradukis la an-
 glan lingvon japane. La japana delegito respondis japane, kiun
 respondon oni tradukis en francan lingvon. La traktato estis redak-
 tata france kaj angle. La franca estis la oficiala teksto por Rusujo,
 la angla por Japanujo. Danĝera metodo ! Estas preskaŭ neeble ek-
 zakte traduki ĉiujn nuancojn. Ni do ne miru se akraj disputoj esti-
 ĝas kiam, pro kaŭzo de konfliktoj, la partioj ne konkordas pri la
 ĝusta senco de la teksto. Ĉu oni ne asertas ke la milito de 1870 inter
 Francujo kaj Germanujo eksplodis pro la fakto ke Bismarck ŝanĝis
 la tekston de telegramo ? Ankaŭ dum la lastaj monatoj la mondo
 spertis la danĝeron kiun prezentas la uzo de nacia lingvo por inter-
 naciaj rilatoj. Vi ĉiuj legis en la ĵurnaloj kian elektran atmosferon
 kreis en Eŭropo la malbona traduko de nur *unu vorto* (asbald) de la
 Germana respondo al la demando de la delegitoj de la Locarno-
 landoj.

Tiuj ekzemploj sufiĉas. La homaro urĝe bezonas internacian di-
 plomatian lingvon ne nur por plifaciligi la interrilatojn, sed ankaŭ
 por ebligi internacian kunlaboron por la paco.

ESPERANTO estu tiu lingvo !

G. BROODCOORENS.

Gratulo

S-ro Georges Mertens edziĝis kun Fraŭlino Voet (ambaŭ de la
 Mehlena Grupo). Al la juna paro, ni prezentas niajn plej bonajn
 gratulojn kaj deziras al ili multan feliĉon en ilia nova vivo.

SUBTENO POR NIA REVUO.

| | |
|---|------------|
| G. Debrouwere | 10,— fr. |
| A. Cognie | 20,— fr. |
| Kolekto dum la Genta kongreso | 142,90 fr. |
| Monskatoleto N.E.L.E. Brussel | 26,15 fr. |
| D. Fall (Londono) | 11,50 fr. |
| M. Maekelberg | 5,— fr. |
| A. Van der Meulebroecke | 5,— fr. |
| En tute : | 220,55 fr. |

POR NIA PROPRA SKRIBMASINO :

S-ro J. Telling: 10,— fr.

Diversaĵoj

11-aj INTERNACIAJ OLIMPIAJ LUDOJ

En Berlin fondiĝis komitato por servi al ĉiuj Esperantistoj, kiuj intencas ĉeesti la olimpiajn ludojn en Berlin. Ĝin gvidas S.ro Walter Dempwolff, Essener Strasse, 13, Berlin NW 21.

Al li bonvolu sin turni ĉiuj interesatoj, kiuj deziras informojn pri la O. L. Estas dezirinde, ke kiel eble plej multaj Esperantistoj skribu al la komitato, ĉar tio helpos fari efikan propagandon ĉe la kompetentaj institucioj germanaj. Por respondo oni aldonu internacian respondkuponon.

La Berlinaj samideanoj faros sian eblon por agrablighi al la gastoj la restadon en la germana ĉefurbo.

GRAVA SUKCESO

Grava sukceso certe estas la enkonduko de Esperanto en la Poŝtsparkason (*Pocztowa Kasa Oszczednosci*) de Lwow, Polujo.

Gravaj negocaj rilatoj kun firmaoj en Budapeŝto kaj en Wiesenburg, klare montris al la potenca pola entreprenisto, Poŝtsparkaso, ke la gepatra lingvo, la pola, ne taŭgas kiel interkomprenilo kun du malsamlingvaj landoj, kaŭzante nur Babel-turon. Senescepte Esperanto firmigis la gravajn rilatojn kun la indikitaj firmaoj kaj la koncernan interkorespondan taskon lerte kaj perfekte plenumis nia konata kaj malnova samideano s.ro Bronislaw Tuskiewicz, estro de la administra fako en la Poŝtsparkaso de Lwow.

La interesa fakto pri la praktika valoro de esperanto en la komerca vivo konvinkis la estimatan direktoron de la Poŝtsparkaso de Lwow, S.ro Eugeniusz Szubert, kaj dank'al lia bonvolemo vivestigis esperantokurso gvidata de S.ro Tusz Riewicz. Partoprenis ĝin S.ro Direktoro kaj la geoficistoj de la Poŝtsparkaso.

Por praktike prezenti la personan konversacion inter du malsamlingvanoj, S.ro Direktoro Ŝubert invitis la vianan prelegantinon, S.aninon Minuška Mantel, kiu paroladis pri temo : « Ĉirkaŭ la mondon kun la verda stelo ».

Por ĝuigi al la fervore aŭskultantaj geoficistoj juvelon de la pola literaturo, S.ano Jozef Toczysky laŭtleĝis fragmentojn el « Sinjoro Tadeo », majstroverko de Mickiewicz en la mirinda traduko de Grabowski.

Fino Minuška Mantel kaj ĉefinstruisto Jozef Toczysky disponigis siajn esperantokolektaĵojn kaj la sciavidaj estontaj verdstelanoj kontente partoprenis la belegan Scherervojaĝon. La finon kronis enmarnigo de flora korbo al la prelegintino, prezentita de la propaganda ĉefo de P.K.O., S.ro Zymunt Vogel en la nomo de la oficistaro, kaj komuna fotografiĝo.

El « *Nia Gazeto* ».

* * *

La F.U.K.E. (Flandra Unuiĝo de Katolikaj Esperantistoj) eldonas etan lernolibron. Kiel reklamilo ĝi certe tre taŭgas en Flandrujo kaj Nederlando, kiel lernolibro, kompreneble iom tro malgranda. Ĝi estas havebla po 2 frankoj (Nederlando 15 cendoj). Poŝtekkonto No 4123.54 de Kath. Vl. Esperanto Verbond — Aalst.

* * *

Ciuj Esperantistoj-radioaŭskultantoj skribu kaj skribigu tuj al Direction Générale de la Radiodiffusion, rue de Grenelle, 103, Paris. Petu pri turismaj paroladoj aŭ prelegoj pri industrio, kamp-kulturo, komerco, havenoj k. t. p. Skribu tuj. La momento estas favora. Francujo havas novan registaron favoran al internaciaj ideoj.

* * *

La Nederlanda Ministro de instruado, artoj kaj sciencoj denove decidis, ke S.ro J. Van Audel, inspektoro de la gimnazia kaj mez-grada instruado, estu ŝtata delegito ĉe la ekzamenoj aranĝataj de la Nederlanda Esperanto-Ekzameno-komitato.

* * *

RADIO !

U. E. A. estas la grandioza labormaŝino de la Esperantistaro. Unu el ĝiaj servoj estas la « Internacia Radio-servo ». Ĉu vi, kara samideano, eluzas la grandan propagandoblecon, kiun donas la I. R. S. ? Verŝajne ne ! La radio-servo ĉiumonate dissendas la plenan radio-programon por la venonta monato. La programo havas nur efikon, se ĝi estas represata en la nacilingvaj gazetoj nacilingve en la diversaj landoj. En la monato Marto okazis pli ol 150 Esperanto-dissendoj radiaj. Jen grandioza propagando por Esp., sed nur, se en ĉiuj landoj ĉiuj radio-emuloj konstante vidas la grandan programon plenan. — En Danlando nun la devizo estas : « Ĝis Pentekosto 1936 ĉiuj danaj gazetoj devos enhavadi la plenan Esperanto-programon ! » Ni eklaboris kun granda sukceso. Jam kelkaj danaj grand-gazetoj presas la plenan programon. (Vidu Heroldon kaj Praktikon !)

La gazetistoj ja sentas la dezirojn de la legantaro kaj tiu deziro, en la tempo de la « Esperanto-epidemie », akcelas Esperanton.

Esperanton en la radion ; Esperanton en la turismon ! Helpu nin okupi Danlandon !

Jen viaj taskoj :

1-e : Skribu tuj al la gazeto Politiken, Kopenhago kaj petu Esperanto-dissendojn per la dana radio, stacio Kalundborg. (Se vi jam skribis, bonvolu skribi denove). (Poŝtkarto sufiĉas).

2-e : Petu la Esperanto-prospektojn de la « Turistforening for Danmark », Kopenhago.

3-e : Vizitu en la somero Danlandon « La Paradizo en la Nordo » !
Kune ni estas fortaj !

Aug. WEIDE, Ce-instruisto, Kornmond-lernejo — Silkeborg

DANLANDO

PORTU VIAN STELON !!

VERDAN STELON VI METU SUR VIAN BICIKLON

Biciklantojn kun verda flageto oni en la lasta tempo ofte renkontas, tamen tiuj flagetoj havas la malavantaĝojn, ke ili estas uzataj ankaŭ por aliaj celoj, kaj ke la emblemo sur ili ofte ne rapide estas distingebla.

La novan propagandilon, faratan de senlabora samideano, oni povas fikse munti sur la malantaŭan kotŝirmilon de la biciklo. Ĝi ĉiam estas klare videbla, kiam oni veturas malantaŭ samideano.

Novarĝenta neoksidebla ringo ĉirkaŭas la blankemajlan platon, kies diametro estas 35 milimetroj. La verda stelo do estas sufiĉe granda, kaj bone distingebla.

La aspekto de la tuto similas al tiu de la konataj ruĝaj reflektoroj.

La prezo f 0,35 estas rimarkinde malalta.

Krom tio oni devas pagi la sendkostojn.

Ili estas por unu ekzemplero, sendita kiel specimeno, 8 cendoj : Per poŝtpaketo de unu kilogramo (sendkostoj f 0.20) mi povas sendi 8 ekzemplerojn. Mendoj estas plenumataj post ricevo de la pago.

Ni esperu ke baldaŭ miloj da bicikloj surhavas tiun vere bonegan distingilon.

Bonvolu provizore (ĝis 1-9-'36) mendi la stelojn ĉe S.ro P. Moen (kasisto de la haga sekcio) Nunspeetlaan, 508, Den Haag. Poŝtĉek-konto no. 4463.

EEN MOEDER VAN 364 KINDEREN.

In het degelijk maandblad van het sympathieke Vlaamsche Kruis, waarvoor de Heer J. Vandersteen in ons Aprilnummer een oproep tot samenwerking deed, vinden we onder bovenstaanden titel o. a. :

« ... De oplossing van het raadsel is gelegen in een kloostergrap uit de 18de eeuw. Volgens het in 't Latijn geschreven verhaal beviel Margaretha van Hennenberg den 2n Januari 1276 in het klooster van Loosduinen, toen zij op reis was, van een tweeling waarvan de eene helft Elisabeth, de andere Johannes heette. De geestige kloosterbroeder duidde de geboorte van den tweeling aan met de woorden, dat zij toen zooveel kinderen kreeg als er reeds dagen in 't jaar waren. Dit woord « reeds » werd in de Latijnsche tekst uitgedrukt door het Latijnsche woord « cam », dat men later echter vertaalde door « nog ». En dus las men toen « zij baarde zooveel kinderen als er nog dagen in 't jaar waren ». En nu was het jaar 1276 een schrikkeljaar, telde dus 366 dagen : dus las men, dat de edele vrouwe 366—2= 364 kinderen ter wereld bracht ! ... »

Wat ons, Esperantisten, weer eens het bewijs levert dat er met Latijn kemels te schieten zijn, terwijl het klare Esperanto dergelijke misverstanden onmogelijk maakt. En de gevolgen, die hier komisch zijn, konden soms wel eens tragisch uitvallen, zooals onlangs de vertaling van het duitsche « alsbald » voor de Franschen bijna aanleiding werd, tot het uitbreken van een oorlog met Duitschland.

Diplomaten vinden Esperanto te klaar, zij visschen liever in troebel water.

L. CALLOENS.

Grupa Vivo

ANTVERPENO — FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTO.

Merkredon, la 15an de Julio okazis la duonjaran reelekton de parto de la estraro. Nia prezidanto S.ro Jef Genar kaj S.ro Jos Vander Steen sekretario, esprimis la deziron ne plu esti reelektitaj pro seriozaj kaj akcepteblaj kialoj. Ni ĉiuj bedaŭris tiujn decidojn, ĉar ni scias kiom nia prezidanto kaj nia sekretario faris por nia grupo. Ili senlace kaj kuraĝe laboradis por nia afero. Nia grupo atingis sub ilia gvidado altan nivelon de prospero. La tuta grupo estos ĉiam dankema pro la farita laboro kaj pro la kreo de vera amikeca sfero en nia rondo.

La elekto de nova prezidanto ne estis nun tro malfacila, ĉar ni depost kelkaj tagoj havas junan advokaton en nia medio ! Kompreneble ĉies pensoj direktiĝis al li kaj li estas elektita per ĉiuj la voĉdoniloj kaj kun brua aplaŭdo de ĉiuj la ĉeestantoj : estas S.ro Edgard Verheyden, kiu ĝis nun estis simpla sed vigla membro. Ni estas certaj ke nia grupo trovos en li la veran gvidanton, kiun ni bezonas por anstataŭi nian Jef.

Kuraĝe kaj ĝoje al la laboro, S.ro Verheyden, kaj Vi ĝuos la dolĉan memkontentigon en nia grupo post la laciga studado en la universitato ! Ni esperas ke Vi ne tro frue forlasos nin kiel prezidanto !

Kiel unuan sekretariinon oni elektis F.inon Mertens kaj kiel dua sekretariino funkcios F.ino Keverijn. Ili estas du junaj kaj viglaj koroj, kiuj certe faros sian eblon por kontentigi ĉiujn membrojn por la bono de nia grupo.

BRUSSEL — N. E. L. E.

Nia grupo ekzamenis kaj unuanime aprobis la enhavon de la ligaj cirkuleroj, per kiuj ni estis invitataj repeti nian aliĝon, kiel sekcio, al Flandra Ligo. La necesajn ŝanĝojn ni faris al nia grupa statutaro pro la deviga aniĝo de ĉiuj anoj al la Ligo.

La 18-an de Junio okazis nia jarkunveno. El la jarraporto de la protokolisto ni sciigis pri nia laboro dum la pasinta jaro. Ĉi tie ni nur citu la ĉefajn punktojn : niaj regulaj semajnaj kunvenoj, la organizado de paroladoj (en E. kaj, propagandcele, en Nederlanda lingvo), distraj kaj perfektigaj vesperoj, Ĉseh-kurso, (36 kursanoj), kursfina festo, eldono de bulteno, partopreno al nia 7-a nacia kongreso (12-ope) k.t.p.

La grupa kaj komerca kasistinoj poste raportis pri la financa stato de la grupo. Ni aŭdis grandajn ciferojn kaj povis konstati kontentigajn saldojn. Pri la biblioteko raportis anino I. Druant, bibliotekistino.

Laŭstatute la estraro eksciĝis. Pro tempomanko, nia prez., J. Vandendooren, rezignis je sia posteno. Kiel novan prezidanton la sekcio elektis s.anon G. Broodcoorens. La ceteraj komitatanoj estas unuanime reelektitaj : E. Cortvriendt sekr., protokolisto : A. Ackaert, grupa kasistino : E. Sindhwad, komerca kasistino-bibliotekistino : I. Druant.

Dum la someraj monatoj nia grupo kunvenos nur unufoje monate: la unuajn jaŭdojn de Julio kaj Aŭgusto. Ekde Septembro ni denove kunvenos ĉiujaŭde. Jaŭdon, la 2-an de Julio, nia prez. parolis pri : E. kaj internacia politiko. Sabaton, la 11-an de Julio, ni grupe ĉeestis la festvesperon en la flandra urbteatro okaze de nia nacia festotago.

La provincestraro rajtigis nin elekti librojn por nia biblioteko en valoro de 250 fr. Tiu subvencio ebligas al ni pliriĉigi nian jam ampleksan librokolekton per novaj valoraj verkoj (i. k. la Plena Vortaro). Nia grupo krome abonis kelkajn internaciajn E-gazetojn. Sekve ni povas havigi legajojn laŭ ĉies gustoj. Montru daŭre vian intereson ĉeestante regule niajn kunvenojn !

RONSE — LA PACA STELO.

La 8an de Julio « ĝenerala kunveno » okazis en nia kunvenejo kutima « Concordia » kie, kiel ĉiam, la Esperanta standardo flirtis al la fasado, kiel stimulo alvokanta la gesamideanojn.

La antaŭan tagon, ĝuste antaŭ 7 jaroj, fondiĝis nia grupo kaj ni supozis kunveni multe da « stelanoj », sed ho ve, nur 24 kunbatalantoj postenis kvankam la tagordo estis sufiĉe grava.

Proksiman fojon ni atendos 40 personojn kaj ili tie estos.

La estraro estis kompreneble kompleta kaj la unua parto de la estraro estas reelektita per la plimulto de la voĉdoniloj, nome la subskribanto de tiu-ĉi humila raporto kiel prezidanto, la kasisto S.ro De Ruyver, kiu funkcias kiel plenfavora kaj simpatia bibliotekisto, plue nia helpsekretario S.ro Ockerman, ankaŭ ĉiam sindonplena estas ambaŭ reelektitaj kaj ĉiuj vice estas aplaŭditaj, signo de kontenteco pri la estraranoj.

La estraro kompleta ne dormos ĝis kiam oni estos rangiginta en nia urbo, nian societon en la rangoj de la plej aktivemaj kluboj.

Telegramon oni forsendis al la honora membro S.ro Ferla kiel dankesprimon pro la akirita monsukceso : oficiala kuraĝiga venko.

La grupo ankaŭ transdonis sian unuan mendon al la Fl. Instituto de granda vortaro de Vanderstraten por la biblioteko.

Kiel distraĵo ni ekskursos al Overmeire bicikle kaj vagonare la 9an de Aŭgusto. Neniu forgesu alkroĉigi la flageton propagandan kaj kunporti la kantanon.

Kaj nun membraj geamikoj ! antaŭen ĉiam memorante la fidoplenajn vortojn : EN LABORO PACA NE LACIGOS !

La angulo de la serĉemuloj

Al la ensendinto de la plej bonaj solvoj, ni promesas belan premion. Ĉiu solvita vorto valoras por 1 poento. Le premio estos do por tiu, kiu akiros la plej altan nombron da trovitaj vortoj.

La solvoj estu ensendataj antaŭ la 5a de Septembro rekte al S.ro F. Volders — Bredastraat, 94, — Antwerpen.

PROBLEMO 9

Literproblemo : La tuta frazo konsistas el 37 literoj kaj estas bona konsilo al ĉiuj esperantistoj.

- 9. 1. 12. 17. 13. 11. 21. 30. 14 : Idealo.
- 3. 31. 34. 35. 23. 8. 30. 2 : Komencanto.
- 26. 8. 37. 30. 13. 5. 26. 1. 30. 14 : Gvidanto.
- 4. 26. 35. 30. 34. 36 : Parto de jaro.
- 6. 26. 25. 11. 22. 19 : Halto, ripozo de soldatoj sen-tendoj.
- 27. 33. 24. 32. 7 : Mezuro por la grandaj distancoj.
- 20. 28. 16. 26. 2 : Parto de jaro.
- 15. 10. 5. 11 : Koloro.
- 18. 23. 29 : de kontraŭa senco.

Premiitoj por la problemo 7 estas : S.ro Pittoors el Antverpeno (ŝanculo !) S.ro Samijn el Roeselare, S.ro Mortelmans el Edegem, S.ro Roose el Brugge. Ili ricevos post kelkaj tagoj la promesitajn premiojn.

SOLVO DE PROBLEMO 7

| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 | 12 | 13 | 14 | 15 | 16 | 17 | | | | | | | | | |
|----|---|---|---|---|---|---|---|---|---|----|----|----|----|----|----|----|----|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | | | | | | | | | K | | | | | | | | | | | | | | | | | |
| 1 | | | | | | | | K | A | N | | | | | | | | | | | | | | | | |
| 2 | | | | | | | | P | A | F | I | L | | | | | | | | | | | | | | |
| 3 | | | | | | | | P | O | R | | G | A | S | | | | | | | | | | | | |
| 4 | | | | | | | | R | E | | E | T | R | | A | G | | | | | | | | | | |
| 5 | | | | | | | | N | E | G | U | S | | A | R | M | I | L | | | | | | | | |
| 6 | | | | | | | | I | G | | L | | A | | E | | N | I | | | | | | | | |
| 7 | | | | | | | | A | K | | O | P | | E | L | F | | I | E | | A | C | | | | |
| 8 | | | | | | | | P | L | A | D | | O | B | S | T | I | N | A | | A | M | A | S | | |
| 9 | | | | | | | | K | O | N | D | U | T | | I | T | A | L | O | | A | K | A | P | A | R |
| 10 | | | | | | | | M | O | R | O | | A | L | | R | | R | R | | A | T | A | K | | |
| 11 | | | | | | | | | O | N | K | L | I | N | | A | V | I | A | D | O | | | | | |
| 12 | | | | | | | | N | A | J | L | | D | O | | A | | E | M | | E | R | P | I | | |
| 13 | | | | | | | | D | O | K | | U | Z | | N | A | V | I | G | | A | M | | L | O | K |
| 14 | | | | | | | | M | U | R | M | U | R | | M | E | L | | A | N | I | L | I | N | | |
| 15 | | | | | | | | S | U | | M | E | S | | R | | T | R | O | | A | K | | | | |
| 16 | | | | | | | | | K | | M | I | L | | S | | | | | | | | | | | |
| 17 | | | | | | | | | T | K | | O | | D | E | | | | | | | | | | | |
| 18 | | | | | | | | | O | R | O | | D | O | N | | | | | | | | | | | |
| 19 | | | | | | | | | P | R | O | K | L | A | M | A | D | | | | | | | | | |
| 20 | | | | | | | | | A | R | O | M | A | | M | E | L | A | S | | | | | | | |
| 21 | | | | | | | | | I | N | A | | O | | | N | | N | U | R | | | | | | |
| 22 | | | | | | | | | G | N | O | M | O | | | A | D | R | E | S | | | | | | |

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA **(Vlaamsche Esperantisten - Bond)**

Voorzitter: H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.

Ondervoorzitter: E. Cortvriendt, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.

Sekretaris: Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.

Penningmeester: Adolf De Keyzer, P. van Humbeekstr., 3, Brussel (West).

Propaganda: Gerard Lenaers, Willemstraat, Hamme.

Postcheck: Flandra Ligo Esperantista, Brussel, Nr 2321.50.

Orgaan: « Flandra Esperantisto », maandblad.

Lidmaatschap: 5 fr.; met maandblad: 25 fr.

AFDEELINGEN :

Aalst: « Pioniro ». Sekr.: Denderstraat, 20.

Antwerpen: « Flandrema Grupo Esperantista ». Sekr.: Mertensstraat, 42.

Brugge: « Katolika Junulara Esperanto-Grupo ». Guido Gezellelaan, 15.

Brussel: « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.). Sekr.: P. van Humbeekstr., 3.

Kortrijk: « Esperantista Grupo ». Sekr.: Moeskroenstraat, 9.

Oostende: « Ostenda Grupo Esperantista ». Sekr.: Oudenburgsche stwg., 8.

Mechelen: « La Estonto ». Sekr.: Vekestraat, 25.

VERTEGENWOORDIGERS :

Arendonck: A. De Troeyer, Gasthuisstraat, 100.

Assche: L. De Rop, Tenberg, 24.

Astene: M. Vanderlinden, Dorp, 54.

Gent: F-ino J. Terry, Raapstraat, 82.

Harelbeke: A. Doornaert, Stasegemstraat, 97.

Wilrijk: D. Mortelmans, Egied Segerslaan, 14.

Ingevolge besluiten genomen tijdens de Kongresvergaderingen te Gent, be-
trekkelijk de werking en het beheer van den Bond, zijn al de groepen en ver-
tegenwoordigers uitgenoodigd geworden hunne vraag tot aansluiting schrifte-
lijk te vernieuwen.

Hierboven zijn alleen vermeld deze die hieraan gevolg gegeven hebben
vóór 15 Augustus. De andere zullen opgenomen worden in de volgende num-
mers.

Een oproep is ook gedaan tot de personen welke bereid zijn de taak van
vertegenwoordiger te aanvaarden in de plaatsen waar F.L.E. er nog geen bezit.
Toetredingsbulletijnen hiervoor mogen aangevraagd worden aan het sekreta-
riaat.

OSTENDO

HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

OSTENDO Hotel-Restaurant VROOME

Bulvardo Rogier 20. Tel 37

Moderna komforto — Moderaj prezoj — Varma kaj malvarma akvo fluanta.

Prenu urbotramon 5 aŭ 6

« BREUGHEL »

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brussel

Lekkere Drinken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)



Varbu

Abonantojn

kaj

Anoncantojn !

Speciale rekomendita Restoracio

„ La Renommée ”

St. Baafsplaats, 3 — GENT — Tel. : 120.12

apud la Belfrido.

Estro VAN DER PLANCKEN persone direktas la kuirejon kaj prizorgos la festenon kaj lundan tagmanĝon de la
7a FLANDRA ESPERANTISTA KONGRESO

Huis aanbevolen door V. T. B.

« Presejo de l' Centro », Kipdorpest, 26, Antwerpen.